



KONGA STELO

Nyota ya Kongo



*Trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo)
kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.*



Enhavo

Front-paĝe :

Gorilo el la parko Virunga, en Rutshuru

Redakcie	1
Raporto el Rutshuru	2
Panzi E-Klubo	3
Kongreso de SAT Amikaro	4
Pri Honoré Sebuhoro	5
Donac-kampanjo de Gomanoj	6
Akiro de vizo	7
Faŭno, flaŭro kaj reliefo	8
Vivmaniero, manĝado, kuirarto kaj veturado.....	9
Manĝkutimo en Goma	10
Fruktodona restado en Rŭando ...	11
Ben Indestege en Goma	12
EPDFE	13
Anoncoj pri korespondpeto	15
Lingvoj : Klasoj de vortoj	16
Kelkaj kongolandaj junuloj	17

Dors-paĝe : La vendisto de la feliĉo,
Julian Modest

Redakcie Joel Muhire



Saluton karaj!

Jen Konga Stelo unujariĝas! La redakcio tiukaze dankesprimas al ĉiuj kies artikoloj jam aperis sur la paĝoj de nia revuo; apartan dankon al orientkongaj esperantistoj! Estas ja admirinde ke esperantistoj el tiu nuntempe malstabila regiono (Norda kaj Suda Kivuoj) daŭre *pli alte tenas* la e-standardon!

Ĉi-numere, denove raportas al vi pri sia e-agado s-ro Honoré Sebuhero el Rutshuru, vi legos pri la kongreso de SAT Amikaro, akiro de vizo... Ne mankas artikoloj pri naturo kaj kulturo, Miriam rakontas al ni pri ŝia restado en Rŭando, Ben Indestege, ŝia edzo kunvenis kun junaj esperantistoj en Goma en junio, la kongolanda ILEI-sekcio kunlabore kun la regiona Ne-Registara Organizaĵo EPDFE volas enkonduki Esperanton en lernejojn de Norda Kivuo. Kiel ĉiam, je via dispono estas nova leciono pri la sŭahila: *klasoj de vortoj*. Junaj esperantistoj de Goma lanĉis monokolektan kampanjon, legu prie sur la paĝo 6.

Bonan legadon!



Konga Espero (KS) estas trimonata informilo de DKEJO (Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo) eldonata kunlabore kun aliaj kongolandaj organizoj.

Redaktoro: Joel Muhire

Kontaktoj: joelmuhire0@gmail.com, Tel. +243 977 643 030

La estraro de DKEJO (2025-2028)

Prezidanto : Waziwazi Grâce,

Tel. +243 976 413 837, rete: dkejo@outlook.com.

Vicprezidanto : Ramazani Nanjira, Tel. +243 981 137 264

Sekretario : Jofina Mungosy, Tel. +243 979 051 901

Kasisto : Ornella Idumba, Tel. +243 970 702 532

Konsilanto: Carine Idumba, Tel. +243 893 174 046

Kiel sendi kontribuojn al Konga Stelo?

- ✓ Prefere sendu tekston originale verkitan en Esperanto kun foto/bildo memfarita.
- ✓ Se vi sendas tradukaĵon, bv. indiki la originajn fontojn, lingvon kaj aŭtoron. Pri fabelo indiku, ĉu ĝi estas popola (kaj de kiu popolo) aŭ verkita de vi.
- ✓ Fotoj devas esti bonkvalitaj. Ne forgesu aldoni la nomon de la artisto aŭ de la fotinto!
- ✓ Bonvolu sendi vian artikolon rete kiel kutiman retmesaĝon aŭ en format RTF al:

joelmuhire0@gmail.com plej laste, je la fino de ĉiu tria monato.

- ✓ Viaj kontribuoj povas temi pri e-agado en via loĝregiono, poemoj, kulturo (manĝaĵo, vivmaniero, bredado, transporto, ktp), naturo, rakontoj, humuraĵoj, lingvoj, ktp.

Koran antaŭdankon pro via kontribuo!



DKEA: Demokratia Kongolanda Esperanto Asocio, fondita en 1963.

DKEJO : Demokratia Kongolanda Junulara Organizo, fondita en 1984.

ILEI: Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.
www.ilei.info.

Bonvolu subteni la redaktoran laboron : UEA-konto : jmhr-a.

RAPORTO PRI E-MOVADO EN RUTSHURU

APRILLO KAJ MAJO 2025

Honoré Sebuhero - Rutshuru

I. STATO DE KLUBOJ

I. A. VERDA STELANO-KLUBO (VSK)

Ni havas du aspektojn, inter alie renkontiĝojn kaj lernadon dum tiuj lastaj du monatoj:

Renkontiĝoj kaj lernado

- En aprilo kaj majo, niaj du kategorioj de membroj bone progresis kvankam la vivkondiĉoj estas nuntempe niaregione nebonaj pro malpaco.

- En aprilo kaj majo niaj membroj kunvenis 4 fojojn. VSK funkcias en sama oficejo kiel la "Reciproka Solidareca Interhelpa Societo", franclingve: Mutuelle d'Entraide Solidaire.

- Ni dividis la monaton en du periodojn, la unuan periodon (du tagojn): Farante prezentojn kaj dialogojn kaj alian periodon esplorante gramatikan stilon. Kaj tio validas nur por iamaj klubanoj. Pri komencantoj, necesas fari testojn post lerni la tagan kurson sen forgesi hejmtaskon aŭ praktikan laboron.

• Okazis aliaj kunvenoj kun la instruistoj de Buzito-Instituto por diskuti pri iliaj horaroj. Ili certigis al ni, ke venontmonate (junie) ili donos al ni precizan respondon pri serioza lernado de Esperanto. Ili pardonpetis, ke ili havas zorgojn por plenumi dum ili instruas en Buzito mezlernejo.

• **Listo de lernantoj:** Sylvie Kahindo Nzilamba, Gentile Kavira Lekki, David Sadiki Biriko, Dubois Bahati Kerakabo, Espoir Runazi, Bwenge, Ombeni Kerakabo, Anne Marie, Prudent Niringiye, Audace Bineza, Marcel.

Ĉi tiuj lernantoj estas je la 16-a leciono de la 22-leciona programo de la franca pedagogo Hubert Ferez.

I. B. ĈIAM ANTAŬEN

- Kvankam ni estas en periodo de malsekureco, kelkaj infanoj sekvis la kurson kun kuraĝo. La nombro bedaŭrinde tre malgrandiĝis ĉar kelkaj el la gepatroj de la infanoj fuĝis al najbara lando Ugando kaj la aliaj iris al aliaj provincoj de DR Kongo. Tiuj ĉi kuraĝaj infanoj atingis la 10-an lecionon de la programo *Esperanto per rekta metodo*, de StanoMarĉek;

- La infanoj ludis interparolajn kaj deklamajn ludojn;

- Ili praktikis simplajn ludojn en Esperanto;

- En junio, la infanoj kiuj lernas Esperanton en la klubo *Ĉiam Antaŭen* prepariĝas por fari siajn jarfinajn ekzamenojn. Post tio, ili havos dusemajnan paŭzon dume, ili revenos al la Esperanto-kurso;

Tiuj ĉi kuraĝaj infanoj atingis la 10-an lecionon de la programo *Esperanto per rekta metodo*, de StanoMarĉek.

- La infanoj povis viziti sian samklasanon kiu malsaniĝis; tiu iniciato ĝojigis la gepatrojn de ĉi tiu infano. Tiu vizito donis kuraĝon al kelkaj gepatroj sendi siajn infanojn al ĉi tiu malgranda teamo.

- Nia lernanto *Héritier Kwizera* daŭre faras sian Esperanto-trejnadon en la lernejo Buzito. Li estas finonta sian staĝon la 30-an de junio 2025.

I. C. INSTITUTO BUZITO/NJILI

- La Esperanto-kurso estas bone instruita ene de la *INSTITUTO BUZITO*.

- La lernantoj partoprenis la Esperanto-ekzamenon dum la unua semestro. Ĉi-junie, ili faros Esperanto-teston. Ni kuraĝigas ilin pli bone studi por asimili la materialon kaj poste havi bonajn rezultojn.

II. LA RICEVITAJ LERNOMATERIALOJ DE NIA PARTNERO SAT-AMIKARO.

En la lasta raporto aperinta en la 4a numero ni lanĉis peton pri libroj, kiuj povus helpi niajn lernantojn. Feliĉe, **SAT-AMIKARO**, Franca asocio akceptis nian peton kaj sendis al ni ludokartojn, Lenovo-komputilon, kelkajn gramatikajn librojn, kraĵojn, legolibrojn kaj poŝvortarojn. La membroj de Verda Stelano-Klubo, *Ĉiam Antaŭen* kaj la membroj de la *lernejo Buzito* elkore dankas tiun asocion, aparte la reprezentantojn de SAT Amikaro **Éric Eliard** kaj **Lucette Echappé**.

Antaŭ du semajnoj ni ricevis ilin el la poŝto-ficejo en Kisoro/Ugando.



PANZI ESPERANTO-KLUBO (PEK)



PANZI ESPERANTO-KLUBO, branĉo de la neprofitcela asocio *COPROFER*, daŭrigas sian batalon por konsciigi kaj disvastigi la lingvon Esperanto en la oriento de Demokratia Respubliko Kongo aparte kaj en DR Kongo ĝenerale. Dimanĉe, la 8-an de junio 2025, la klubo okazigis sian plej novan trejnan sesion. Tiuokaze kelkaj lokaj aŭtoritatoj kaj loka radiostacio estis invitataj partopreni kaj kunlabori por antaŭenigi Esperanton en Kongo.

Franclingvan raporton pri tio konsultu ĉi tie : <https://watoto.news/actualite/2025/06/11/bukavu-esperanto-un-pont-vers-le-monde-pour-les-jeunes-de-panzi/>.

Por sukcese antaŭenigi ĉi tiun iniciaton, COPROFER-PEK petas vian financan, materialan kaj moralan subtenon.

Moses Byamungu el Bukavu
mssbyamungu@gmail.com

Kongreso de SAT Amikaro: Per-retaj kontribuoj de afrikanoj

Joel Muhire – Goma / Eriko – Parizo

SAT Amikaro, franca neŭtrale laika, liberpensa, progresema asocio organizas ĉiujarajn kongresojn. Foje estas invitataj afrikanoj retprelegi tiuokaze. Lunde, la 26an de majo 2025 posttagmeze, okazis virtuala SAT-Amikara programo.

La SAT-Amikara Kongreso 2025 okazis ĉeeste en la urbo *Vigy* en la norda parto de Francio. En speciala programo por afrikaj esperantistoj, la 26an de majo posttagmeze; prelegis esperantistoj el Senegal, Madagaskaro, Benino, DR Kongo kaj kompreneble la membro de SAT Amikaro, s-ano Patrick Lagrange!

S-ano François Hounsounou el Benino prelegis pri la benina agrikulturo, s-ano Lafi Charles el Senegal respondis al diversaj demandoj pri la e-movado kaj la landa politiko ĝenerale, same Henriel el Malagasio.

Joel Muhire el Goma – DR Kongo priparolis Kongan Stelon, la revuo de *DKEJO*, *Demokratia Kongolanda Esperantista Junulara Organizo*. S-ino Judith prezentis en antaŭregistrita videaĵo sian Neregistaran Organizaĵon *EPDFE* kiu preta enkonduki Esperanton kunhelpe de la kongolanda ILEI-sekcio en elementajn lernejojn de Norda Kivuo (legu pri tio sur la paĝo 13), Jean de Dieu Kikako prelegis pri Paradoksa lando kaj Alphonse ĉirkaŭparolis la de li prizorgatan asocion *Solidareco Bona Volo* (SBV).

La programo pri tio jenas:

Lunde, la 26an de majo – posttagmeze

- **14h 15h : Kio pri la klimatsanĝiĝo?** prelego de Patrick Lagrange – Tiu temo estas

tre aktuala en la nuntempo kaj interesa por ĉiuj teranoj.

- **15h-18h Parolado de esperantistaj geamikoj el Afriko**

Enkonduko : vortoj de la prezidantino de SAT-Amikaro Ansofi Markov kaj diversaj salutvortoj **(15h 00)**.

- La benina agrikulturo: "diversaj produktoj", projekcio de fotoj kun prikomentado de François Hounsounou, el Benino **(15h10)**.
- Demandoj/Respondoj pri la e-movado en Malagasio (Madagaskaro), de Henriel **(15h50)**
- Demandoj/Respondoj pri Senegal, aŭ aliaj temoj, de Lafi Charles kaj lia kolego Asane **(16h20)**.

Paŭzo (10 minutoj)

- Prelego pri la nova gazeto "Konga Stelo" de Joel Muhire kaj iomete pri la movado en DR Kongo/ antaŭpreparita filmo aŭ rekta parolado laŭ la ebleco de Joel (eventuale partopreno de Kolegino de Joel; s-ino Judith Dusabe pri EPDFE, en la Franca) **(17h00)**.

- Diro de persona verko "Paradoksa lando" de Jean de Dieu Kikako el DR Kongo kaj eventuale deklamo de poemo **17h30 – 18h00**.

<https://www.sat-amikaro.org/>



PRI HONORE SEBUHORO



Samideano Honoré SEBUHORO priparolas sin kaj prezentas al viaj siajn poresperantajn atingojn depost li esperantistiĝis en 2004. Legu pli sube!

Karaj geamikoj, jen biografieto pri mi :
Mi naskiĝis en Kavumu la 3-an de marto 1974, en la Provinco Norda-Kivuo (Demokrata Respubliko Kongolando). Mia patrino bedaŭrinde ne plu vivas; ŝi forpasis en 2015. Mia patro estas pastoro en la 55-a KOKBP (Komunumo de Orient-Kongaj Baptistaj Preĝejoj), franc-lingve "55^e CEBCE", (*Communauté des Eglises Baptistes au Congo-Est*).

Koncerne min, mi estas edziĝinta kaj havas kvin jam grandaĝajn gefilojn: tri filojn kaj du filinojn, la plej juna filo havas 14 jarojn. Ili ĉiuj studas en malsamaj lokaj


Nu, ni portu la verdan standardon kiel sim-bolon de unuiĝo!

mezlernejoj kaj praktikas Esperanton, ĉie kie ili troviĝas.

Miaj poresperantaj atingoj

Mi lernis Esperanto perkoresponde de la forpasinta nederlanda profesoro *Hans Bakker* ĉirkaŭ 2004, li korektadis min kaj havigadis al mi lernolibrojn. En 2006; li direktis min al UEA por fariĝi individua membro. Tiel, mi membriĝis en Universala Esperanto-Asocio, kaj regule ekricevis jarlibrojn kaj monatajn revuojn. En 2009; Hans Bakker kaj Renato Corsetti el Italio konsilis al mi krei klubon. Do, mi kreis la klubon **Verda Ste-**

lano-Klubo (akronime: VSK) kiu jam havas statuton. Tiu ĉi klubo estis kaj daŭre estas aktiva spite malfacilaĵojn kaŭzatajn ĉefe de malsekureco. Kelkaj plej fervoraj esperantistoj, iamaj membroj de VSK estas **Joël Muhire, Prime Nsabimana, Ŝem Kabanza, Nickson Kasolene, Justin Kaze**. Mi estas Esperanto-instruisto ekde 2007 kaj mi dirus, ke tiu ĉi agado estas kiel mia profesia kaj rutina kvalifiko. Ankaŭ, mi enkadras lernejanojn en Buzito-Mezlernejo Esperante ekde 2013, kaj mi instruas du malsamajn grupojn, **Verda Stelano-Klubo** kaj **Ĉiam antaŭen** (infana grupo).



Kiam mi aŭdis unuafoje la vorton "**Esperanto**", mi sentis admiron, flugon, inspiron kaj ĝojon. Mi ĝuis ne nur la lingvon, nek nur la ŝatatan de mi legadon de E-libroj, sed ĝuas ankaŭ interrilatojn de: *anoj de Verda Stelano-klubo, SAT-AMIKARO, Esperanto-Sumoo, UEA, KCE -anoj, ACE, FEL, Esperanto info, Esperanto en marche, ktp.*

Nu, ni portu la verdan standardon kiel simbolon de unuiĝo! Kiu ajn estu nia aĝo, ni lernu kaj legu revuojn, lernolibrojn!

El persona vidpunkto

Fakte, mi esperantistiĝis ĉar mi trovis Esperanton belsona, paca, neŭtra kaj unueca.

Ni esperantistoj celas disvastigi Esperanton por iom post iom realigi ĝiajn pozitivajn valorojn:

- Propedeŭtikecon por lingvo-instruado.
- Kontaktojn inter ordinaraj homoj.
- Kontaktojn sendiskriminaciajn.
- Novtipan internacian kulturon.

Esperanto-kursoj

Po Box 08 Bunagana – Kisoro, Ugando.

Rete: honsebn@gmail.com

UEA-kodo: **hose-t**

Vacapo: **+243997852933**

P.S. Iom da klarigo:

Ni ofte uzas Ugandan poŝtadreson ĉar niaregione ne plu ekzistas poŝta servo. Orientkonganoj el provincoj Norda kaj Suda kiuvo ofte uzas poŝtadresojn el najbaraj landoj Ugando, Ruando kaj Burundo.

Donackampanjo por Gomanoj

Ekde la invado de Goma (Norda Kivuo) en Januaro 2025, tre malfacilas la vivkondiĉoj de la urbanoj kaj cetere de ĉiuj kies urboj, urbetoj, vilaĝoj, ... estas sub okupo de la ribelantoj, M23! Esperantistoj ankaŭ spertas postefikon de tiu longe daŭranta milito kiu ŝiras la orienton de Kongo DR. Kiel membroj de la esperantista familio, junaj esperantistoj de Goma petas ĉies helpon laŭ-bontrove. Pli detale pri la donackampanjo legu en: <https://gofund.me/oc74ce4d>.

Redakcio

Akiro de vizo, kaporompa por kongolandanoj

Moses Byamungu – Bukavu

Akiri vizon en Afriko, kaj Kongo DR ĝenerale fariĝis kaporompa! Kivu-anoj kutime akiris siajn vizojn en Kigali, Rŭando sed pro la milita perturbo en la regiono, vojaĝemuloj el tiu parto de Kongo DR elturniĝas por trovi solvon en Kenjo.

Samideanoj Michael Bimenyimana, Marcelin Luheka (el Goma) kaj Moses Byamungu (el Bukavu) vojaĝis junie al Kenjo por serĉi vizon, esperante flugi al Brno, Ĉeĥio por partopreni en la 110a Universala Kongreso de Esperanto. La redakcio de Konga Stelo kontaktis s-anon Moses Byamungu pri tiu vojaĝo kaj akirebleco de la vizo en Kenjo, jen lia atesto:

"Konsiderante la sekurecan krizon en Goma kaj Bukavu, akiri vizon fariĝis grava suferado, ĉar la belga ambasadejo en Kigali (Ruando) estis fermita post la milito trudita de Ruando.

Por Schengen-vizo, konganoj el ĉi tiu parto de la lando (Norda kaj Suda Kivuoj) devas iri al la belga ambasadejo en Kenjo (Najrobo).

"Ni devas transiri: Rŭandon, Ugandon, kaj fine Kenjon." Transiri en Rŭandon estas facile; oni bezonas nur pasporton aŭ CPGL-dokumenton. De Bukavu ĝis la limo inter Kongo DR kaj



Michael Bimenyimana kaj Moses Byamungu

Rŭando la veturo kostas 1.000 kongajn frankojn, de la limo ĝis la granda bus-haltejo en Kamembe (Rŭando) la veturkosto estas 2.000 FRW (ĉirkaŭ 5.000 kongaj frankoj), de Kamembe ĝis Kigali (la ĉefurbo de Rŭando) la veturkosto estas 8 dolaroj, kaj tie komenciĝas la suferado! De Kigali ĝis Kampalo (Ugando) la veturkosto estas 30 dolaroj. Alvenante ĉe la uganda landlimo, kongolandaj civitanoj

pagas 20 dolarojn por stampigi siajn pasportojn. De Kampalo ĝis Najrobo (la ĉefurbo de Kenjo) oni pagas 30 dolarojn. Alvenante ĉe la kenja landlimo, kongolandaj civitanoj pagas 20 dolarojn aŭ 2 000 KES por stampigi siajn pasportojn. De Bukavu ĝis Najrobo, estas tritaga busveturo. Loĝi en Najrobo estas tro malfacile pro la multekosteco de manĝaĵoj kaj hoteloj. La vivo en Najrobo vere ekstreme kostas.

Por akiri vizon, oni devas plenigi retan vizan petformularon, fari rendevuon, kaj post la rendevuo, oni atendas minimume 15 tagojn kaj maksimume 45 tagojn. La Schengen-vizo kostas 12 600 kenojn (pli ol 100 dolarojn), kaj 4 650 kenojn (46,50 dolarojn) por TLS.

"Mi pagis 12 600 kenojn por la vizo, 4 650 kenojn por TLS, kaj 8 550 kenojn (85,50 dolarojn) por ekstra rendevuo. Entute, aldone al la kostoj por la vojaĝo, hotelo, manĝaĵoj, ... mi jam elspezis 850 dolarojn, kaj mi ankoraŭ ne ricevis la vizon."

NATURO: FAŬNO, FLAŬRO KAJ RELIEFO

Justin Ndagijimana – Rutshuru

La naturo estas la tuto de ĉiuj vivantaj kaj ne-vivantaj elementoj sur la Tero, kiuj ekzistas sen homa kreado. Tri ĉefaj aspektoj estas:

1. Flaŭro (Plantaro)



La Flaŭro signifas ĉiujn plantojn en regiono. La flaŭro en DR Kongo estas vera trezorejo de biodiverseco kun densaj arbaroj kaj gigantaj arboj. Pli ol duono de la lando estas kovrita de arbaroj. En DR Kongo ni trovas: palmojn, bananujojn, teksilojn, arbojn por medicinaj uzoj, ktp. La flaŭro varias laŭ klimato: en la pluvarbaroj troviĝas grandaj arboj, dum en savanoj kreskas herboj kaj arbustoj. La kongolanda arbaro ludas gravan rolon en la reguligo de la klimato.

2. Faŭno (Bestaro)

La Faŭno signifas ĉiujn bestojn en regiono. En DR Kongo troviĝas elefantoj, goriloj, simioj, leopardoj, antilopoj, birdoj, reptilioj, okapi-oj, fiŝoj... tiuj bestoj estas troveblaj en la naciaj parkoj: Virunga, Salonga, Kahuzi-Biega aŭ Garamba.



Minacoj

Bedaŭrinde, la faŭno de DR Kongo alfrontas multajn minacojn, inkluzive de:

Senarbarigo: pro arbohakado, agrikulturo kaj la kreskanta postulo je ligno.

Ŝtelĉasado: por la kontraŭleĝa komerco de arbustviando kaj eburo.

Protekto

Malgraŭ ĉi tiuj defioj, oni klopodas protekti la faŭnon de DR Kongo, inkluzive de:

Protektindaj areoj: Naciaj parkoj kaj rezervejoj estis establita por protekti speciojn kaj ekosistemojn.

Konsciigo: Konsciigaj kampanjoj estas farataj por informi lokajn loĝantarojn pri la graveco de biodiverseco kaj ĝia konservado.

Kontraŭ-ŝtelĉasado: Patroloj estas efektiviĝataj por kontraŭbatali ŝtelĉasadon kaj kontraŭleĝan komercon.

Daŭripova disvolviĝo: Iniciatoj estas efektiviĝataj por antaŭenigi ekonomian disvolviĝon, kiu konsideras mediprotektadon.

3. Reliefo (Tera formo)

Reliefo temas pri la formoj de la tero. DR Kongo havas ebenaĵojn (ĉefe en la centro), montojn (oriente, ĉe la limo kun Ruando kaj Ugando), altebenaĵojn kaj valojn. Montoj kiel Rwenzori, Nyiragongo kaj Mitumba estas parto de la orientkonga reliefo.

Konkludo

DR Kongo estas bunta faŭne, flaŭre kaj reliefe. La faŭno, la flaŭro kaj la reliefo bezonas protekton kontraŭ detruado kaj/aŭ prizorgon por ke ĝi daŭre nutru kaj subtenu la vivojn de la venontaj generacioj.

Kulturo : vivmaniero, manĝado, kuirarto, kaj veturado

Justin Ndagijimana – Rutshuru

Mallonge pri kulturaj temoj en DR Kongo: *vivmaniero, manĝado, kuirarto, kaj veturado*.

1. Vivmaniero

En nia lando, la vivmaniero varias inter urboj kaj vilaĝoj.

En grandaj urboj kiel Goma, Kinŝaso, Lubumbaŝo,... homoj vivas kun modernaj kutimoj: ili laboras en oficejoj, komercas kaj tiel plu. En kamparaj lokoj homoj vivas pli tradicie, okupas sin per agrikulturo, bredado, manlaboroj, ktp. La familiaj rilatoj estas tre fortaj kaj respekto al pliaĝuloj estas fundamenta.

2. Manĝado

Manĝado estas grava kultura momento. Homoj ofte manĝas kolektive, precipe en vilaĝoj, el unu granda manĝujo. En urboj homoj opinias sin civilizitaj kaj klopodas ĉiam manĝi lukse sed en vilaĝoj oni manĝas modeste, foje nespicitajn manĝaĵojn. Rizo, terpomoj, legomoj, Sambaza/ndagala (fiŝetoj), estas tre popularaj.



Manioka tubero elterigita

La plej kutimaj manĝaĵoj en Norda Kivuo estas: pasto el manioka aŭ maiza faruno, terpomoj, fazeoloj, brasikoj, viandoj, fiŝoj, maizoj, ... kaj fruktoj, kompreneble: karoto, banano,

avokado, mango, ananaso, citrono, ... Oni montras gastamon per bona manĝo al vizitantoj.

3. Kuirarto

La kuirarto en Kongo estas riĉa kaj bunta. Fufu (aŭ bukari) estas tre ofta. Ĝi estas pasto farita el manioka aŭ maiza faruno. Pongu (sombe) estas saŭco el maniokfolioj, kuirita kun oleo kaj spicoj. Oni normale manĝas paston kun supo el sombe, viando, fiŝoj, aŭ aliaj legomoj, terpomoj kun fazeoloj, Estas virinoj kiuj kutime kuiras.



Maniokaj folioj : Sombe

4. Veturado

La maniero veturi dependas de la loko :

En urboj, oni uzas busojn, taksiojn, motorbiklojn kaj foje privatajn aŭtojn. En vilaĝoj, homoj ofte piediras en padoj, biciklas aŭ uzas boatojn. Vojoj ofte estas en malbona stato, kio malfaciligas transportadon, precipe en kamparaj lokoj.

Konkludo

La kulturo en la DR Kongo estas tre riĉa kaj diversa. Ĉiu elemento: la vivmaniero, manĝado, kuirarto kaj veturado, montras la tradicion, forton kaj adapteblecon de la kongolanda popolo.

indagijimana19@gmail.com

Manĝkutimo de la loĝantaro de Goma

Bimenyimana Serugendo Michael - Goma

La koro de la hejmo: La kuirado

En multaj domoj, la preparado de la manĝoj komenciĝas je la tagiĝo. Fajro brulas sur metalaj forneloj, karbo griziĝas, kajodoro de cepoj kaj tomatoj ŝvebas en la aero. Tie, patrinoj, fratinoj, foje eĉ najbaroj, kuniĝas por kuiri ne nur por la stomako, sed ankaŭ por la animo. Kuirado en Goma estas simpla. Por multaj, ekzistas neniu elekto inter elektra forno kaj gaso, karbo aŭ ligno estas la kutima solvo.

La kutimaj pladoj

La plej ofta kaj amata plado estas fufu, farita el maniokfaruno aŭ foje maizo. Ĝi estas kunmanĝata kun saŭco el legomoj, ofte sombe, verdaj muelpistitaj



Manioka supo

folioj de manioko, boligitaj, spicitaj, kaj foje miksitaj kun arakida pasto, loknome "tshonga (legu: *ĉonga*)".

Rizo kaj faboj estas alia bazo de la ĉiutaga manĝo, modesta sed tamen energia. Vendeje kaj en restoracioj, oni povas aĉeti jam manĝpretajn frititaĵojn kun viando aŭ legomoj, terpomojn kun fazeoloj, ... tagmeze la vendistoj kaj eĉ lernantoj mildigas la malsaton per tiuj manĝaĵoj. Chapati (ĉapati), maldika pano influita de orientaŝtato kuirarto, aperas sur la tablo kiam la familio sukcesas trovi iom

da ekstra mono, kaj por tiuj, kiuj povas permesi al si, fiŝetoj el la Kivu-lago precipe sambaza aŭ ndakala (malgrandaj sekigitaj fiŝetoj), freŝa tilapio estas trezoro sur la tavolo.

Spicoj, spirito kaj simpla riĉeco

Eĉ se manĝaĵoj estas simplaj, ili neniam estas sen gusto. La ruĝa kapsiketo (loknome: pilipili), redonas apetiton, sed ne al tiuj kiuj stomakdoloras. La spicoj, kvankam modestaj, portas la spiritojn de generacioj. Ne temas nur pri satiĝo, sed pri tradicio, identeco, kaj amo.

Manĝi kune kiel montrado de rezisto kaj espero

En Goma, manĝi kune estas io pli ol kutimo, ĝi estas formo de rezisto. En mondo kun nesekureco, en urbo kun malfacilaj ekonomiaj cirkonstancoj, la fakto kuiri kaj manĝi kune estas pruvo, ke la vivo daŭras, ke la popolo ne cedas. Ĉiu plado estas silenta rakonto pri patrino kiu penas por ŝiaj infanoj, pri knabo kiu vendas panon surstrate por pagi sian lernadon, pri najbaroj kiuj dividas eĉ la lastan rizmezuron.



FRUKTODONA RESTADO EN RŬANDO

S-ino Miriam Ingabire raportas iom koncize pri ŝia amrilato kun Ben Indestege kaj fruktodona restado en Rŭando. Legu ŝian sinprezenton en la numero 2 de nia revuo, paĝo 19 kaj pri ŝia edziniĝo al Ben Indestege en la numero 4, paĝo 8.

Saluton geamikoj!

Mi estas Miriam Ingabire, mi naskiĝis en Rutshuru, DR Kongo sed nuntempe mi estas en Rŭando pro la vojaĝo, do post kelkaj semajnoj mi ekvojaĝos al alia lando.

Unue mi dankas Dion pro ĉio kion li faras por ni homoj, kaj dankas al ĉiuj homoj kiuj helpis min lerni Esperanton; ĉar dank'al Esperanto mi konis multajn aferojn. Kompreneble ĝi estas paca, amikeca, ponta, kaj internacia lingvo, do en ĝi mi havas amikojn el la tuta mondo.

Mi ŝatus diri ion pri mia vojaĝo: en mia vivo mi neniam estis vojaĝema sed por mia unua fojo mi vojaĝis eksterlanden dank'al Esperanto, precize al Aruŝo, Tanzanio. Tie mi renkontiĝis kun bonaj personoj, amikoj kompreneble; mi ankaŭ trovis tie amon de mia koro, Ben Indestege kies edzino nuntempe mi estas.

Pri mia vizito de Rŭando: unue mi ekeniris Rŭandon por bonvenigi mian edzon en novembro 2024, estis mia unua fojo eniri tiun landon, belan kaj ordeman.

En februaro 2025 mi eniris Rŭandon duafoje. Dum tiu tempo mi kaj mia edzo vizitis kvin urbojn (Gisenyi, Kigali, Butare, Kibuye kaj Ruhengeri aŭ Musanze), en tiuj urboj ni parolis pri Esperanto al scivolaj homoj kiuj aŭdis nin babiladi en Esperanto, lingvo fremda al ili; ni donis aplikaĵojn kiel "kurso de esperanto kape" por ke ili povu memlerni Esperanton, donis retpaĝojn el kiuj ili povu informiĝi pli pri Esperanto. En la urbo Gisenyi, apud Goma (Kongo DR) ni ekkomencis instrui al kvar personoj pro la kuraĝo de Ben Indestege kaj dank'al la helpo de Joel Muhire.

Mi esperegas ke eĉ se ni forlasas Rŭandon kelkaj homoj jam scias ion pri Esperanto kaj tiuj kiuj jam komencis lerni tiun lingvon informos iom post iom al aliaj Rŭandanoj pri Esperanto, tiel nia lingvo estos konata en tuta Rŭando kie laŭ nia konstato homoj apenaŭ scias pri Esperanto.

La kontaktoj de Miriam Ingabire jenas :

Tel: +(243) 992057230

Email: alliancemiriam@gmail.com



Ben Indestege en Goma – DR Kongo



Joel Muhire – Goma

En junio 2025 s-ano Ben Indestege revenis el Belgio Afriken por sia geedziĝa festo, kiel promesite en januaro. La 25an de Junio 2025 li kunvenigis kelkajn junajn esperantistojn de Goma kaj Rutshuru por reciproka interkonatiĝo kaj invitis ĉiujn partopreni en la festo okazonta la 12a de julio 2025 en Goma. Post kelkhora babilado, Miriam invitis nin ĉetabliĝi por agapeca kunmanĝado. Antaŭ ol ĝisdiri unu al la alia, ni komune fotiĝis.

Ĉiuj ĝojis pro la afableco de Ben kaj Miriam kaj dankis pro la invito.

S-ro Ben intertempe loĝas en Gisenyi, Rŭando sed foje transiras al Goma, por renkonti bofa-

milianojn. Dum lia restado en Rŭando, li "*semas kaj semas konstante*" Esperanton, kaj jam kelkaj el liaj varbitoj komencis lerni Esperanton pervacape (kun Joel Muhire). La hazardo kiu renkontigis ambaŭ s-anojn Ben kaj Miriam, estas avantaĝa por Esperanto. Ĉiuj kiuj prenis Esperanton en io bagatela, nun komprenis ke Esperanto estas mirakla lingvo, per kiu eblas eĉ trovi sian amon.

Ben kaj Miriam geedziĝis en januaro (legu en Konga Stelo, numero 4a, paĝo 8).



EPDFE, Kune por la Protekto kaj Digno de Virinoj kaj infanoj



Foto de Judith Dusabe, ĝi ilustras la agadon de EPDFE

*Sinjorino Judith Dusabe,
la estrino de EPDFE
judithdusabe0@gmail.com
Ŝi tamen ankoraŭ ne parolas
flue Esperante.*

Joel Muhire kaj Judith Dusabe – Goma

PRESENTADO DE LA ORGANIZAĴO

1. Historio

Kune por la Protektado kaj Digneco de Virinoj kaj Infanoj, franc-lingve: ***Ensemble Pour la Protection et la Dignité des Femmes et Enfants***, mallonge EPDFE, estas neprofitcela, humanitara, feminisma, nepolitika, neregistara organizaĵo funkcianta en Norda Kivuo, Demokratia Respubliko Kongo. Ĝi estis kreita en 2022, registrita je la provinca nivelo sub dekreta n-ro 01/380/CAB/GP-NK/2024, ĉe la Justica instanco kaj Gardisto de Sigeloj sub n-ro JUST. 112/846/NK/2024, ĉe la Divizio pri Sociaj

Aferoj sub n-ro 08/DIVAS/N-K/AS/61/2024, ĉe la Planado-Divizio sub n-ro 1692/DPP/NK/2024. Ĝia ĉefsido troviĝas en la Urbo de Goma.

Celoj

Ekde la kreiĝo, EPDFE engaĝiĝas por antaŭenigi la fundamentajn rajtojn de virinoj kaj infanoj; subtenas iliajn iniciatojn kaj klopodojn por ilia soci-ekonomika integriĝo kaj firmiĝo de paco. EPDFE ĉiam distingiĝis per sia engaĝiĝo al marĝenigitaj loĝantoj, precipe virinoj kaj infanoj trafitaj de humanitaraj krizoj kaj

konfliktoj. Por atingi sian celon, EPDFE fiksas al si jenajn celojn:

- Plifortigi la lokan virinan gvidadon kaj packonstruadon per plibonigo de paca kunvivado;
- Helpi virinojn malkovri iliajn fortojn aŭ rimedojn kaj uzi ilin por psikologia, socia, ekonomia bonfarto instruante la loĝantaron rezisti la ŝokon pro diversaj krizoj.
- Batalo kontraŭ la feminigo de malriĉeco plifortigante virinojn ekonomie por ilia povigo;
- Kontribui al la forigo de ĉiuj formoj de perforto kontraŭ virinoj, knabinoj kaj infanoj por ilia partopreno en la socia kaj daŭrigebla evoluo de nia lando DR Kongo.

Sperto:

Ekde 2022 ĝis nun, EPDFE laboras en preventado kaj protektado provizante trejnadon, konsciigon kaj sociekonomikan subtenon al virinoj, knabinoj kaj infanoj, kiuj estas viktimoj de konfliktoj kaj naturaj katastrofoj en rifuĝintaj lokoj en Goma kaj ĉirkaŭaĵo. Ni subtenas iliajn ekonomiajn memkreajn agadojn por ebligi ilin eskapi el malfacilaj vivkondiĉoj.

Kunlaboro kun aliaj NROj:

EPDFE estas membro de malsamaj aretoj (Genro, GBV, Edukado, WASH, ...); membro de la platformo **Unio de Virinaj Organizaĵoj** (*Union des Organisations Féminines: UOFH*), membro de la **Sinergio de Virinoj por Paco kaj Sekureco (SVPS)**.

2. Nia Vizio:

- Por levi kaj protekti la fundamentajn rajtojn de virinoj kaj infanoj en la Demokratia Respubliko Kongo.

- Traktante konstantajn psiko-sociajn defiojn ene de la pli larĝa komunumo.
- Promocii en la socio la laŭdindan kaj nemalhaveblan intencon respekti la dignon de ĉiu homa persono certigante la psikologian bonfarton de virinoj kaj infanoj en la DR Kongo.

3. Geografia kovrado: DR Kongo.

4. Areoj de interveno

1. Virina Gvidado kaj Virina Povigo;
2. Infanprotektado kaj pledado;
3. Akvo, Higieno kaj Sanigo;
4. Edukado
5. Manĝaĵ-sekureco
6. Konstruado de paco kaj bona regado.

PROJEKTO DE EPDFE

Ekde marto, mi (Joel Muhire) membras en tiu regiona NRO, EPDFE, kies estrino, Judith

DUSABE, estas komencanto. Ŝi konsentis ke la NRO promociu Esperanton kadre de edukado kunlabore kun nia ILEI-sekcio. Por ke sukcesu tiu projekto, ŝi antaŭvidas disdonon de lerneĵaj utilaĵoj (dorsosakoj, kajeroj, skribiloj, kraĵonoj, mezuriletoj ...) al 5000 lernantoj de diversaj lernejoj de Norda Kivu, kie Esperanto estos instruata.

EPDFE do serĉas ĉu esperanto-organizaĵon ĉu individuon kiu povus trovi financojn por tiu celo, per ekzemple www.gofundme.com.

Se tiu projekto sukcesas, Esperanto estos sendube vaste konata kaj en Goma kaj en aliaj regionoj de Norda Kivuo.

S-ino Judith aldonas klarigon prie:



"Ekde 2021, orienta DR Kongo alfrontas militon, kiu skuas nian landon. La provinco Nord-Kivuo estas la plej trafita dum pli ol tri jardekoj, ĉar ĝi lim-tuŝas Ruandon. Amasa delokiĝo de la loĝantaro kreas malriĉecon kaj ekstreme malfacilan medion por infanoj kaj iliaj familioj; rifuĝintoj pene pagas lerneajn kotizojn, uniformojn kaj lerneajn provizojn por siaj filoj kaj aliaj tute ne kapablas sendi siajn filojn lernejen.

Tial EPDFE, kiel parto de sia programo Edukado por ĉiuj, lanĉas monkollektadon por subteni



5 000 lernejanojn, per lerneaj ilaroj valoraj je 225 000 USD, por ke ili povu rekomenci sian lernadon en bonaj kondiĉoj. Ĉiu donaco helpas oferti al ili pli bonan estontecon per edukado.

Ni invitas vin dividi ĉi tiun iniciaton kun viaj amatoj kaj konekti nin kun aliaj organizaĵoj por kunlabori kaj vastigi nian reton kaj subtenajn programojn. Kune, ni povas oferti al tiuj kompatindaj infanoj la ŝancon rekonstrui siajn vivojn kaj estontecon per edukado. Dankon pro via malavareco kaj engaĝiĝo!" Elfrancigo de ŝia mesaĝo.

Anoncoj pri korespondpeto :

Mi estas **Héritier HAKIZIMANA BARASEBANYA**, mi naskiĝis en Rutshuru, la 27an de decembro 1997. Mi membras en Verda Stelana Klubo. Mi deziras korespondi kun aliaj esperantistoj por plibonigi mian Esperanton.

Vacape : +243992237371.

Rete : kwizerabarasebanya@gmail.com



Mi estas **Niyonzima Twagira Emmanuel**, esperantisto el DR Kongo loĝanta precize en Kiwanja (Rutshuru) en Norda-kivuo. Mi estas diplomita pri pedagogio, sed pro la milito kaj malsekureco mi ne havas laboron. Por vivteni mian familion, mi okupiĝas pri motorbiciklado rondveture de Kiwanja al Goma, urbo situanta proksimume 80 kilometrojn norde de Kiwanja. Mi



volas korespondi kun vi.

Retadreso: emmanueltwagira973@gmail.com

UEA kodo: emnt-c, **Vacapnumeron** : +243976642688, **Fesbuko**: Emmanuel Twagira



Leciono pri la Svahila lingvo

KLASOJ DE VORTOJ

En la sŭahila, kiel same en la aliaj bantuaj lingvoj, la substantivoj estas dispartigitaj, ne en gramatikaj genroj de la tipo “vira/ina/neŭtrala”, sed en substantivaj klasoj. En la sŭahila ni ne faras distingon inter difinitaj kaj nedifinitaj substantivoj, same kiel estas ina aŭ vira.

RESUMTABELO DE LA NOMINALAJ KLASOJ DE LA SŬAHILA

KLASOJ	PREFIKSOJ		EKZEMPLOJ	SEMANTIKAJ KATEGORIOJ
M-/WA	M-	MW-	(persono, ŝtelisto)	Plejparte nomoj de homoj.
<i>Singularo</i>			mtu, mwizi	
<i>Pluralo</i>	WA-	W-	watu, wezi	
M-/MI	M-	MW-	(arbo, monato)	Nomoj de arboj, plantoj, naturo, partoj de la homa korpo, homaj agadoj.
<i>Singularo</i>			mti, mwezi	
<i>Pluralo</i>	MI-	MI-	miti, miezi	
JI-/MA	Sen aŭ kun J		(okulo, dento)	Nomoj de fruktoj, ĉiutagaj objektoj, homoj, pligrandigiloj, vortoj de araba origino, ktp.
<i>Singularo</i>			jicho, jino	
<i>Pluralo</i>	MA-, M-, ME		macho, meno	
KI-/VI	KI-	CH-	(seĝo, kaserolo)	Objektoj, bestoj, homaj korpopartoj, homoj, diminutivo, lingvoj.
<i>Singularo</i>			kiti, chungu	
<i>Pluralo</i>	VI-	VY-	viti, vyungu	
N	N-	NY-	(vesto, viando)	Abstraktaj aŭ konkretaj aferoj, homoj, bestoj, naturaj elementoj, vortoj de fremda origino, ktp.
<i>Singularo</i>			nguo, nyama	
<i>Pluralo</i>	N-	NY-	nguo, nyama	
U	U-	W-	(vizaĝo, kanto)	Nomoj de objektoj, abstraktaj substantivoj, nomoj de landoj.
<i>Singularo</i>			uso, wimbo	
<i>Pluralo</i>	NY-	NY-	nyuso, nyimbo	
KU	KU-, KW-		(legi, legado) KUSOMA	verboj (infinitivo kaj gerundio)
Loko	PA-, KU-, M-		(loko) MAHALI	Nur unu nomo. Ili estas ĉi tie en klas-akordoj

DIFINOJ

Ni priskribu la partojn de vortoj :

- **RADIKALO:** Ĉi tiu estas la parto de la vorto, kiu restas senŝanĝa tra la malsamaj derivaĵoj de vortoj, ĉu substantivoj, ĉu adjektivoj, ĉu verboj.

Ekzemplo: SAFARI (vojaĝo, vojaĝoj), **m**SAFIRI (vojaĝanto), **wa**SAFIRI (vojaĝantoj), **ku**SAFIRI (vojaĝi, vojaĝanta).

- **PREFIKSO:** Ĝi estas litero, aŭ silabo metita antaŭ la radikalo de substantivo, verbo aŭ de adjektivo. La prefikso estas ofte uzata kiel interrilatigo (klaso, persono, nombro, ktp.)

Ekzemploj: mZUNGU (eŭropano), waZUNGU (eŭropanoj).

kuSOMA (legi), uSOME (legu).

- **INFIKSO:** Ĝi estas litero aŭ silabo, metita meze de vorto, ĝenerale en verbo, inter prefikso kaj la vorta radikalo.

Ekzemploj: naKUambia (mi diras al vi), aliMpiga (li batis/frapis lin).

- **SUFIKSO:** Ĝi estas litero aŭ silabo, aldonita je la fino de vorto. Kelkfoje estas simple la fina vokalo de la vorto, kiu ŝanĝiĝas.

Ekzemplo: ananunuA (li aĉetas), anunuE (ke li aĉetu).



Kelkaj kongolandaj junuloj

Waziwazi Grâce – Goma

Ĉi tiu listo ne inkluzivas plenkreskajn esperantistojn. Ĝi ankoraŭ estas aktualigenda, ĉar daŭras ankoraŭ kontaktado kun aliaj kluboj funkciantaj en nia lando.

N°	NOMO	URBO	PROVINCO
1	Kael Max MITAGO FUMULAMBA	Boma	Malsupra Kongo
2	Charline TUMUSIFU BUHENDWA	Bukavu	Suda Kivuo
3	Esher MUJUNGA MUNWA	Bukavu	Suda Kivuo
4	Fidèle CIKURU BALOLA	Bukavu	Suda Kivuo
5	Musoro Benjamin	Bukavu	Suda Kivuo
6	Lubemba Mbula François	Bukavu	Suda Kivuo
7	Gédéon RUBUNGO BANYANGA	Goma	Norda Kivuo
8	Sarah TULINABO BAMBONA	Goma	Norda Kivuo
9	Carine AZIZA IDUMBA	Goma	Norda Kivuo
10	Alphonse KUBUYA MALIRO	Goma	Norda Kivuo
11	Grâce Germaine WAZIWAZI	Goma	Norda Kivuo
12	Eric TUMAINI BAENI	Goma	Norda Kivuo
13	Merveille FURAHA BATUMIKE	Goma	Norda Kivuo
14	Docile REHEMA BATUMIKE	Goma	Norda Kivuo
15	Simon MUTEULE MALIRO	Goma	Norda Kivuo
16	Clement KIMONA KIKANDA	Goma	Norda Kivuo
17	Caleb KATEMBO KASOLENE	Goma	Norda Kivuo

18	Joelle NGOY KIBWE	Goma	Norda Kivuo
19	Daniel BIMENYIMANA SERUGENDO	Goma	Norda Kivuo
20	Etienne KATEMBO LUHEKA	Goma	Norda Kivuo
21	Philomene WANDJO	Goma	Norda Kivuo
22	Homella AZAMA IDUMBA	Goma	Norda Kivuo
23	Prélude KABUYAYA VUTSUHE	Goma	Norda Kivuo
24	Nestor MASUDU IDOLWIA	Goma	Norda Kivuo
25	Ken KAMBALE MUTEKE	Goma	Norda Kivuo
26	Kelly MUMBERE MUTEKE	Goma	Norda Kivuo
27	Marcelin LUHEKA	Goma	Norda Kivuo
28	Daniel BIMENYIMANA	Goma	Norda Kivuo
29	Jean de Dieu KIKAKO	Goma	Norda Kivuo
30	Kelly MUTEKE	Goma	Norda Kivuo
31	Etienne LUHEKA	Goma	Norda Kivuo
32	Freddy PENDEKI	Goma	Norda Kivuo
33	Daniel BIMENYIMANA	Goma	Norda Kivuo
34	Fidèle LUHEKA	Goma	Norda Kivuo
35	Ken MUTEKE	Goma	Norda Kivuo
36	Sabin MARUHE	Goma	Norda Kivuo
37	Solange KISUKI	Goma	Norda Kivuo
38	Faustin SEBATANA	Goma	Norda Kivuo
39	Vincent KASIWA	Goma	Norda Kivuo
40	Dieume MANZEKELE	Goma	Norda Kivuo
41	Damien CHANGWI	Goma	Norda Kivuo
42	Israel BALOLA	Goma	Norda Kivuo
43	James BANDU	Goma	Norda Kivuo
44	Josaphate BUGURANE	Goma	Norda Kivuo
45	Emily MASIKA	Goma	Norda Kivuo
46	Laetitia KAVIRA	Goma	Norda Kivuo
47	Djoy LUHEKA	Goma	Norda Kivuo
48	Celine MASIKA	Goma	Norda Kivuo
49	Djofina Mungosi	Goma	Norda Kivuo
50	Prince KANYATA	Kindu	Maniema
51	Esther EKOFO	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
52	Joel PEPE MASAMBA	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
53	Arno LANDU NDENGA	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
54	Hope MBOYO	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
55	Fideli BAKALA MIKASU	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
56	Bénédicte VUATA SUNDA	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
57	Joel NTUMBA STHIALA	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
58	Benifelicia NZUNZI KISAMBA	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
59	Jonathan MUTOMBO AMUTOM	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
60	Débora SIMBI MASSAMBA	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
61	Prunelle NDOLETHE KITENGE	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa

62	Charlotte NZUNZI LUEMBA	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
63	Mireille GAZZA SHOTSHA BELA	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
64	Emmanuel BITI	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
65	Brigitte MOPUNZI NGEMINA	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
66	Tony BODJILLO BONGONDO	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
67	Déborah BOLINGO MATINA	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
68	Sarah Zaina	Kinshasa (Kinšaso)	Kinshasa
69	MUHOLEZA MBOMBA	Kolwezi (Kolūezi)	Kolwezi (Kolūezi)
70	Crispin ILUNGA LAVIE	Lubumbashi (Lubumbašo)	Supra Katanga
71	Joseph KIBUGU MUSHAURI	Lubumbashi (Lubumbašo)	Supra Katanga
72	Jeanncy KYUNGU KIBALE	Lubumbashi (Lubumbašo)	Supra Katanga
73	Espoir KASATI	Lubumbashi (Lubumbašo)	Supra Katanga
74	Héritier HAKIZIMANA BARASEBANYA	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
75	Emmanuel TWAGIRA	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
76	Jolie BAZIRAKE	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
77	Miriam ALLIANCE	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
78	DUSABE BARIGIRA	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
79	Love KAMBALE AMANI	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
80	Bienfait Bin Regxo MACHUMU	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
81	Jacques Tumaini RUKERA	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
82	NDABATEZE Muomba	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
83	Prime NSABIMANA NTUBAKUNZE	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
84	Immaculée N'HABIMANA	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
85	Espoir AMANI KARYOKO	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
86	Eysée KAKULE KATOKE	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
87	Justin NDAGIJIMANA	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
88	Innocent MAKUZA	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
89	Neema MACHOMBO	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
90	Sylvie KAHINDO	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
91	Marie-Reine CHAHI	Ruĉuru (Rutshuru)	Norda Kivuo
92	Bienfait Bijimungu	Uvira	Suda Kivuo
93	Atosha Zurubabeli Uzia	Uvira	Suda Kivuo
94	Sosthène Emmanuel	Uvira	Suda Kivuo
95	Bonne Idée Malekera	Uvira	Suda Kivuo
96	Ramazani Amisi Nanjira	Uvira	Suda Kivuo
97	Byamungu Benoît	Uvira	Suda Kivuo
98	Madjaluwa	Uvira	Suda Kivuo
99	Florence Charline	Uvira	Suda Kivuo
100	Buda Rukwabuka Kazingu	Uvira	Suda Kivuo
101	Jean-Luc TONI	Uvira	Suda Kivuo
102	Mauriac NUNDA	Uvira	Suda Kivuo

La vendisto de la feliĉo, Julian Modest

En la urba bazono, ĝuste tie, kie estas la lastaj vendotabloj, troviĝis eta vendejo, en kiu maljunulo vendis feliĉon. Mi miris, kiel eblas vendi feliĉon kaj kiuj aĉetas feliĉon, tamen antaŭ la vendejo 44 ĉiam atendis multaj homoj. Ja, iuj vere bezonas feliĉon. Iam mi decidis eniri la etan vendejon kaj kompreni, kiel la maljunulo vendas feliĉon. Kompreneble mi bone sciis, ke ne eblas vendi aŭ aĉeti feliĉon, tamen mi estis ege scivola. Kiam mi ekstaris antaŭ la vendejo, estis tagmeze kaj feliĉe ĉi tie ne estis aliaj homoj. Enirante la vendejon, mi iom miris. Mi supozis, ke ĝi estas malluma, mallarĝa, sed okazis, ke la vendejo estas vasta, pura, kaj la suno lumigas ĝin. Ĉe la granda fenestro pendis blankaj kurtenoj, en la mezo de la ejo staris ronda tablo kaj kelkaj seĝoj. Sur la muro, kontraŭ la pordo, estis bildo – montara pejzaĝo: arbaro kaj lago kun helblua kristala akvo. En la ejo sonis muziko. Ŝajnis al mi, ke neniu estas ĉi tie, sed aŭdiĝis mola voĉo:

– Bonan tagon, sinjoro, bonvolu.

Mi ĉirkaŭrigardis kaj rimarkis, ke en la angulo, proksime al la fenestro, staras maljunulo.

– Bonan tagon – salutis mi lin.

– Mi venis por vidi kiel ... – provis mi klarigi, sed la maljunulo interrompis min:

– Kiel mi vendas feliĉon?

– Jes – diris mi.

– Bonvolu – kaj li proksimiĝis al mi. Ne eblis diri, kiom jara li estas. Ĉu sepdek aŭ okdek. Malalta kunhara-ro blanka kiel arĝento kaj kun okuloj, kiuj havis la koloron de la lago sur la pejzaĝo. Li estis preskaŭ elegante vestita, malgraŭ ke lia grizkolora kostumo aspektis iom eksmoda. Lia ĉemizo estis neĝblanka, lia pantalono precize gladita, kaj li havis malhelflavan kravaton. La maljunulo atente rigardis min de la kapo ĝis la piedoj eble por diveni, ĉu mi havas sufiĉe da mono por aĉeti feliĉon. Dum li esploris min, mi rigardis la vendejon, en kiu ne estis kasregistriilo, nek aliaj varoj. Strange, preskaŭ nenio estis en la ejo kaj mi daŭre demandis min, kie estas la vendata feliĉo kaj kion ĝuste vendas la stranga maljunulo.

– La feliĉo – ekparolis mallaŭte la viro – eble por averti min – estas tre multekosta! Jes, oni devas bone pripensi, ĉu oni povas posedi ĝin. Mi deziris denove diri al li, ke mi ne intencas aĉetadi, sed venis pro scivolo, tamen la maljunulo kvazaŭ divenis miajn pensojn kaj daŭrigis:

– Ĉiuj venas ĉi tien pro scivolo, ĉar neniu kredas, ke la feliĉo estas vendebla kaj aĉetebla, sed kiu venas ĉi tien, mi unue demandas lin aŭ ŝin, kian feliĉon li aŭ ŝi deziras, ĉar estas diversaj feliĉoj: feliĉo pro sano, feliĉo pro riĉeco, feliĉo pro amo, feliĉo pro bona familio ... La feliĉo estas unusola. Ekzistas multaj diversaj feliĉoj, tamen mi vendas nur unu feliĉon, ĉu pro amo, ĉu pro sano, ĉu pro riĉeco ... Ne ekzistas feliĉo pro ĉio en la vivo. Multaj aĉetantoj ne povas decidi, kian feliĉon ili deziras, kaj ofte ili foriras sen aĉeti feliĉon. Aliaj aĉetas ian feliĉon, sed poste ili bedaŭras, ke ili ne aĉetis la ĝustan feliĉon, kiun ili bezonas.

– Eble vi scias, kian feliĉon vi deziras? – demandis la maljunulo.

Mi tuj respondis, ke mi tute ne pripensis, kian feliĉon mi deziras.

– Kiam vi decidis, kian feliĉon vi deziras, venu denove – diris la maljunulo kaj iom kapjesis por ĝisrevido. Mi diris „ĝis revido” kaj iris el la vendejo. Irante sur la strato, mi daŭre meditis, kian feliĉon mi deziras: ĉu pro amo, ĉu pro riĉeco, ĉu pro sano ..., sed mi ne povis decidi. La maljunulo pravis: *feliĉo estas nur unu*, ne ekzistas multaj feliĉoj aŭ eble feliĉo tute ne ekzistas.



El "L E G A Ŝ O J XIII", republikigita kun la permeso de Jindřiška Drahotová, Ĉeĥio.